



'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

Ni plezure informas, ke ekde ĉi tiu numeoro "Nova Urbo" **legindas en pli ol 10 lingvoj**. Por hodiaŭ, ili jenas: araba, ĉina, angla, finna, franca, germana, itala, japana, persa, rusa kaj hispana. Sufiĉas nur klaketi sur la helverda fenestreto "Translate" kaj eletkit flagon de via lando. La detatalon montras grafikaĵo lokita fine de ĉi tiuj paĝoj. Nun sekvas la tradiciaj anoncoj pri la novaj artikoloj.

*

Karaj amikoj (kaj amikinoj, kompreneble)! Verŝajne vin surprizis la ilustraĵo por ĉi tiu artikolo. Jen renkontiĝas homo kun testudo: sam-nivele, pro la homa humileco.



La bildeton akompanas ĉi tiu sentitola versaĵo:

God help mi live slowly: To move simply: To look softly: To allow emptines: To let the heart create for us. Amen.	Dio, helpu min vivi malrapide; Moviĝi simple; Rigardi milde; Akcepti malplenon; Permesi, ke mia koro kreu. Amen.
---	--

Ni trovis ĝin antaŭ jaroj en malgranda libro verkita (kaj ilustrita) de **Michael Leunig**, artisto bone konata en Aŭstralio kaj en kelkaj aliaj landoj. Fakte ni povus titoli la versaĵon 'Preĝo de malrapideco' kio ŝajnas tre taŭgi por pandemia tempo. Jen multaj laborejoj estas fermitaj, ekonomio funkcias apenaŭ parte, plimulto da eventoj estas nuligitaj kaj la timigitaj homoj fermiĝis dise en siaj domoj. Estas do oportuna tempo por trankvilaj pensoj, eble eĉ por meditado kaj preĝoj kiel tiu ĉi supra. M.Leunig estas tre interesa artisto, kiu meritas apartan artikolon. J ubileo de lia 75-jariĝo okazas ĉi-monate kaj esperantistoj en Aŭstralio eble salutos lin en nia nomo. Krom tio "Nia Vilaĝo" prezentas ankaŭ kelkajn ideojn pri ekologiaj movadoj.

(La tuta artikolo ĉe: <https://familiaro.com>)

Rompiĝo je oro ŝanĝita

En la antaŭa numero de "NU" estis artikolo pri la deviga restado hejme kaj kiel ĝi kreas streĉojn en geedza vivo. Tion spertas multaj en ĉi tiu "pandemia" tempo. Malgraŭ ĉio, per amo kaj bonvolo, familio povas venki eĉ tre seriozaj malfacilaĵoj. Jen unu ekzemplo de geedzoj, kiuj povas kuraĝigi la aliajn. Memorindas unu nekonata arto el Japanio, nomita *kintsugi* (japane: きんつぎ / eo: *kincugo*?).



Temas pri re-kunigo de rompita valora ceramikaĵo, "gluante" ties apartajn partojn per oro. Oni do ne forĵetas la damaĝitan vazon, statueton, tason aŭ alian ŭjon sed, riparinte ĝin, oni ne nur ĝin fortigas sed ankaŭ ornamas. Tiumaniere la rompiĝo ne estas kaŝita, sed inverse – la oraj linioj alte plivalorigas la objekton, kies damaĝita parto iĝas pli solida ol antaŭe. Eble valoras ĝin memori en krizaj momentoj de la familia vivo? Se vi trovas ĝin utila, provu diskonigi tion inter viaj familianoj kaj geamikoj.

(La tuta artikolo ĉe: <https://familiaro.com>)



Alĝerio – edukado por pli bona mondo

Infanoj estas la kerno de nia laboro, ĉar ili estas estonteco de la socio. Tial ni dediĉas al ili multe da tempo kaj helpas ke ili kresku fortaj.

Por Amine Mohammed Sahnouni, juna alĝera sociologo, edukado estas la procedo: “Ni bezonas transdoni pli da respondeco al infanoj kaj gvidi ilin fide, por ke iliaj kapablecoj por gvidi disvolviĝu jam frue.”



Città Nuova /New City estas socikultura magazino eldonata de Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO – *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO – *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILIO - *Ciudade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Svjat*; ĈILIO – *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; **ESPERANTUJO** - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLUMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO – *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - *Novi Svet*; SVEDIO - *Enald Varld*; SVISLANDO - *Citta Nuova*; URUGVAJO - *Ciudad Nueva*; USONO – *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.



Minacoj de vakcinado

Kvankam en lastaj jaroj aŭdiĝas voĉoj pri malsanoj kaj epidemio, tamen proponoj /postuloj de miliardulo Bill Gates – vakcini ĉiujn homojn en la tuta mondo – montriĝas ŝoka kaj indigna. Tiun planon kontraŭas decideme Robert Kennedy en sia retejo la 9-an de majo 2020.




Natura muzik-terapio (Parto 3)


Por plenumi multajn bezonojn de la kreskanta merkato, la familia firmao de Gibson dungis pli ol 100 kunlaborantojn. Ĝis hodiaŭ disvendiĝis pli ol 20 milionoj da diskoj, produktitaj en “Solitudes”.



Une tio estis klasikaj komponaĵoj, i.a. de: de Bach, Beethoven, Chopin, Debussy, Grieg kaj Vivaldi (la famaj “**Kvar jarsezonoj**”) kaj multaj aliaj ĉe (1:02:44) <https://www.youtube.com/watch?v=j8CVN2Ahnn8> .



Lian sukceson rimarkis aliaj muzik-eldonejoj, kiuj provis imiti tiujn ĉi kanadajn produktojn. Malgraŭ ĉio, Dan Gibson estis la unua, kiu – uzante la tre modernajn instrumentojn – surbendigis multegajn sonojn el naturo: de fluantaj riveroj, zumado de ventoj en arbaro, marbordaj ondoj kun krio de mevoj, ĉirpado de birdoj, dezertan tempeston, tondro de akvofaloj, pluvo falanta surlage ktp. En la postaj diskoj li aldonis melodiojn popularaj nuntempe kaj pli facilaj por ĝenerala publiko.



La rezultojn de lia multjara laboro ĝuas miloj de aŭskultantoj en diversaj landoj. Post morto de Dan Gibson, tiun kolekton transprenis kaj prizorgas lia filo kaj nuntempe ĝi estas grava parto en historio de la unika son-aranĝado. Eble ĝi povas esti nomita eĉ son-arto.

*

Krom tiuj ĉi, ankaŭ aliaj novaj artikoloj legeblas en la junia numero de “NU” -

<https://familiaro.com> .

Translate >>		
<i>FAMILIARO.com</i>		
Artikolo 1	Artikolo 2	Artikolo 3
Artikolo 4	Artikolo 5	Artikolo 6 ...

Supre ni montras grafikaĵon de la blogo “Familiaro” kun ĉiuj artikoloj, aranĝitaj en la kolumnoj. Meze kaj super ili troviĝas la helverda fenestreto. Kiam vi klaketos sur ĝi, aperos flagoj de la lingvoj en kiuj atigeblas ĉiu artikolo. Se vi ŝatus legi aŭ diskonigi iun artikolon en via gepatra lingvo – bonvolu nin informi.

Belan someron – amike, NU red.